EGIPTAJ PLAGOJ EN USONO

Granda sekeco, kiu trafis Usonon, okupas la registaron kaj la mediojn. Kvankam la sekeco grave malaltigos rikoltrezultojn de la maizaj plantejoj, decidis la registaro tute nekompreneble, ke pli da maizo estu uzota por produkto de brulmaterialo ol por bestmanĝaĵo kaj vivtenado. Ĉar komenciĝas manko de furaĝo kaj ĝi estas multekosta, la farmistoj buĉas la brutaron. FAO postulas, ke la produktado de etanolo estu ĉesigita.

Sed la sekeco havas ankoraŭ pluajn sekvojn. Ĉar 85 procentoj de la plantejoj estas trafitaj per sekeco, la rezista sistemo de la kreskaĵoj estas grave malfortigita. Kiam finfine ekpluvis, aperis problemo, kiun neniu atendis. La ekstremaj veterkondiĉoj kaŭzis dramecan disvastigon de la maiza gangreno.

La alte specialiĝita parazita gangreno aperis en sekecaj klimataj terspacoj. Ĝia origina lando estas Meksikio. En la terspacoj de Usono, kie junie kaj julie regis granda sekeco, kaŭzis la pluvo disvastigon de la gangreno, kiu kaŭzas grandajn rikoltperdojn. La gangreno povas ekataki ĉiujn superterajn partojn de la kreskaĵoj kaj ekigas tuberojn, kiuj povas en ekstremaj kazoj atingi grandecon de infaneta kapo. La infekto kaŭzas la tutan formorton de la kreskaĵo. La nutrado per tiu ĉi maiza greno kaŭzas ĉe la brutaro abortigojn.

La specio de la semaĵo, kiu estas por tiuj plantejoj uzata, estas tre rezistema kontraŭ damaĝinsektaro, sed tute ne kontraŭ la gangreno. Post atako de la gangreno oni rekomendas resti la kampojn sen kultivado tri jarojn, sed tio por Usono ne estas realigebla.

Tiuj ĉi fungoj enhavas al ergotamino similajn alkaloidojn. Ili estas parencigitaj kun alkaloidoj, kiujn oni uzadis kiel abortigajn rimedojn. Aspektas tio kvazaŭ ironio, ke la materioj, kiujn oni pli frue uzadis por abortigoj, nuntempe tre negative influigas agrokulturadon en Usono. Kaj tio okazas ĝuste nuntempe, kiam la registaro preskribas senpagajn disponigojn de la kontraŭkoncipaj rimedoj kaj tiamaniere subtenas grandan dekadencon. ■

Kath-net